7-a JARO, N-o 350



LEIPZIG, 18. / 6. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

TRIDEK TRI FENIGOJ[1] POR ĈIU KADAVRO

EN 1931 ANTAŬ VERDUN

Kelkmil terfosistoj, francoj, poloj, araboj, blankuloj, flavuloj, nigruloj forbalaas la rubon de l' mondmurdado. Ostoj k denove ostoj, armiloj, ŝtalkaskoj, grenadoj, grenadoj k ankoraŭfoje grenadoj k ostoj. Tiu ĉi kuŝis ankoraŭ en sia terkavo, sur gardposteno, kien lia taĉmentestro sendis lin. Tiuj tri francaj artilerianoj, inter la rompitaĵoj de sia baterio. Alia, nordfranco, kovrita de splititaj, disŝiritaj ŝtonpecoj, kies rubo kovras la tutan regionon, abunde surkreskitan de mizera verdaĵo, inter kelkaj malgajaj, putrantaj arbotrunkoj. Kelkmil nekvalifikitaj laboristoj trovas "bonan" laboron por 5 ĝis 6 markoj tage, esplorante per la pioĉo en la tero, en kiu kuŝas grenadoj. Se unu ekkrevas — ankoraŭ unu mortinto, ankoraŭ du. Inter la milionoj da mortintoj el Verdun.

Tio estas neforigebla. Tio restas, ankoraŭ hodiaŭ. Eblas, ke post jaro ĝin traplugos la unua plugilo ... ĝi denove elterigos grenadojn, putrintajn ostojn, ŝtalkaskojn, armilojn — — Ili semos sekalon k ree inter la mizeraj garboj rikoltos grenadojn, ostojn. Kiel apud Som (Somme), kie hodiaŭ tie ĉi k tie jam elkreskis nova vilaĝo, en la minejoj de Lan (Lens), kiuj jam delonge realportas profitojn por la minejposedantoj, apud Hartmansvajlerkopf, ĉie, kie la rulcilindro de l' milito rulŝtormis, kie francaj, germanaj, italaj, alĝeraj, siamaj proletoj batalis kontraŭ proletoj, la manojn konvulsie premante ĉirkaŭ pafilo aŭ mangrenado, la vizaĝo pro furiozo k timego distordita, en gaso, en koncentrita kanonado, sub la arda serpento de l' flamĵetilo, en la garboj de maŝinpafiloj. Malantaŭe sidis unu ĉe telefono. "La unua kompanio atakas la francan pozicion! Mi atendas!" La kompanio atakis. Tiu atendis. Neniu revenis. La sekvintoj ankaŭ ne. Armea raporto: Okcidente — antaŭ Verdun oni sukcesis malgraŭ persistega defendo de l' kontraŭulo okupi sur altaĵo francan pozicion. La perdoj de l' malamiko estas grandaj.



Sur la Hartmansvajlerkopf (militfronto)

"La proletoj atakis. La proletoj mortadis."

Kaj nun fosas la proletoj. Ili serĉas ion, sed tio estas ne nur la malĝojigaj restaĵoj de l' milionoj el Verdun. Tio estas ne nur la kompania ordono, la memoro pri la infero de l' tranĉemilito, de l' mortiga, infera interbuĉado pro la rubo de l' fortikaĵoj. Rememoroj ekstaras, sed aliaj.

La 29-an de julio, kvar tagojn post la militdeklaro de Aŭstrio al Serbio — la ŝtono jam estis ekruliĝinta k ne plu haltigebla — en Bruselo kunvenis membroj de la Internacia Socialista Oficejo. La gvidantoj de l' laborista klaso per flamaj vortoj protestis kontraŭ ĉiu milito. Hugo Haze (Haase), reprezentanto de l' germanaj maldekstruloj: "La regantoj atentu, aliokaze la popolo pro tiom da mizero k subpremo vekiĝos k starigos la socialisman sociordon!" Hermano Muler (Müller) veturis komisie de l' germana partio Parizon por konsiliĝi kun la socialista parlamentfrakcio pri la sinteno en okazo de militeksplodo. "Mi konsideras tion neebla, voĉdoni[2] por militkreditoj ĉe ni!" Ĵores (Jaurès) diris: "Al la franca registaro oni ne bezonas altrudi pacaman politikon, ĝi estas same pacama kiel la angla registaro." Kaj li minacis, kiel ili ĉiuj, per la revolucio de l' amasoj, postulantaj en ĉiuj landoj de l' regantoj rekompencon pro la verŝita sango . . .

*

La 4-an de aŭgusto mortfalis, kiel unua viktimo, Ĵores per la mano de franca naciisto. Ged (Guesde) k Vejan (Vaillant) ĝis tiam la maldekstruloj de l' franca partio, kiuj plej decide batalis kontraŭ la militismo eniris la francan ministerion por militaferoj. Konsento al militkreditoj en Germanio, en Aŭstrio, nur en Anglio la Sendependa Laborpartio rifuzis la konsenton... Vandervelde skribis: "Senkompate k sensente proskribi la rason de l' teŭtonoj[1] for de la homaro". "La tago de la germana nacio" skribis la aŭstria socialpatrioto Aŭsterlic. Kaj la proletoj marŝis antaŭen, al Verdun . . .

Kaj estas nun iliaj filoj, negroj, blankuloj, flavuloj, kiuj siajn patrojn elfosas. La ostoj pace putras apud la rustaj, ruĝiĝintaj grenadoj, la fumbomboj el la tempo de l' reĝo Ludo-

[1] Tiu sumeto reprezentas ĉ. 0,08 dolaron.

[1] Germanoj.

viko Filipo, kiujn oni komence de l' milito elmagazenigis, la disfalantaj armteniloj. Kelkiam revekiĝas la milito k krevigas unu el la filoj en la aeron. Kelkiam venas unu el tiuj, kiuj siatempe incitegis la popolojn unu kontraŭ la alia, aŭ iliaj filoj, rigardas la terurajôn, vidas la grizajn kolonojn ĉe l' laboro k ekhavas materialon por gazetartikolo — kontraŭ la milito hieraŭ okazinta. Kelkiam, por momento, trakuras al unu el ili frostotremo de terurego pro la milito, kiu morgaŭ povos ekesti, kiu morgaŭ ekestos.

Sed tie ĉi aperas Ŝneder-Krezo (Schneider-Creusot), Vikers-Armstrong, Krup, Škoda, Betlehem-Ŝtalo, kiuj denove volas havi laboron, ĉar "industrio estas ĉiutempe kapabla akiri necesan por ĝi vendmerkaton", kiel cinike-malkaŝe diris la maljuna Krup. Kaj krome, Deterding, Nobel, La I. G. Farbindustrio, la tutmonda venengasindustrio, kiuj havis sufiĉe da tempo, dum la 15 jaroj depost Verdun, por eksterordinare pliperfektigi la tiam plej malbonan militarmilon. Ruliĝas tra la aviadejoj miloj, milionoj da aeroplanoj kontraŭ la nova malamiko. Tie marŝas la armeoj, la nova pagata soldataro, k kun ili la nigraĉemizuloj, la brunĉemizuloj[1] k "Ŝtalkask"-idoj[2] kontraŭ la ekster- k enlanda malamiko. Tie la nacia junularo de ĉiuj popoloj sin ekzercas por "defendo k korpa plifortiĝo". Tie agrikulturaj lernejoj pretigas, anstataŭ traktoristoj, trupojn por la civilmilito kontraŭ la proletoj, kiuj eble morgaŭ ekribelos kontraŭ la milito.

Jes, ankaŭ tiam, en la Verduna jaro, iu ekribelis. Kelkaj virinoj sidis, Luksemburg k Zetkin, maljunuloj kiel Fr. Mering, en la malliberejoj kune kun la junularo, kies patroj estis pereintaj tie antaŭ Verdun. Sed unu ekribelis, ĵetis signalvorton en la mondon, kiu trovis resonon en ĉiuj landoj. "Civilmiliton kontraŭ milito, prefere la ribelon, prefere la civilmiliton ol la militon!" (Libkneĥt).

Sed miloj devis fali. Miloj malsatmortis sub premo de l' ekspluato k blokado. Militfino. Revolucio, reakcio k koaliciministerio. Kaj ĉiu scias, ke tiu postmilita periodo estas nova antaŭmilita. Ĉiu scias, ke la nova milito estos multe pli terura ol estis la hieraŭa malgranda skuo, k ĝi ekestos. En ĉiuj armadindustrioj fumas la kamentuboj k la proletoj preparas novan materialon pli bonan, ol estis tiu elterigata hodiaŭ antaŭ Verdun. Kaj ĉiu scias, kontraŭ kiu ĝi estas direktata.

Nur unu popolo forbalais siajn ekspluatistojn k militinstigistojn, kiam la milito estis ankoraŭ furiozanta tra la mondo. Unu popolo ne plu konstruas industriojn por detrui industriojn, sed por formi novan mondon. Kaj tiu unu popolo ne plu bezonas militon por "konkeri novajn vendmerkatojn", nome per novaj militoj provi forigi tiujn de l' kapitalismo nedisigeblajn krizojn, sed havas laboron sufiĉan por si mem. Kaj 35 milionoj da senlaboruloj en la mondo estas grava minaco por la tuta ekspluatista k militinstigista klaso.

Ĉu pri tio pensas la franca, germana, usona proleto? Ĉu li vidas marŝi la novajn milionojn al nova Verdun, al nova popolmurdo? Aŭ ĉu li pensas pri siaj laborfratoj en la ruĝa Sovetio, kiuj dum tiuj 15 jaroj kreis novan potencon, la potencon de l' laboristoj k kamparanoj? Kaj — ankaŭ novan armeon, konsistantan ne el pagataj trupoj por subjugigi popolojn, sed el laboristoj k kamparanoj, kiuj batalas por liberigo de l' tutmonda proletaro.

J. M. Lange. Trad. el germ. L. B. (10 411).


[1] Hitleranoj (en Germanio).

[2] Ŝtalkasko ("Stahlhelm") = faŝista batalant-organizo en Germanio.

La Grenfabriko de Zernograd

En 1929 ekzistis en tiu Nordkaŭkaza regiono nur la stepo. Sed laŭ la Kvinjara Plano tie devas stariĝi unu el la 175 grenfabrikoj de l' *grentrusto*. Kaj, dum du jaroj, ekleviĝis en tiu loko la bazo de l' sovĥozo (= soveta komune mastrumata bieno) "Verblud": la gren-urbo Zernograd.

La laboristoj venis en la dezerton. Ĉe profundo de cent metroj ili trovis



akvon. Ili trabatis la vojojn. Ili konstruis grupojn da modernaj domoj, laborejoj, tenejoj, elevatoron, manĝejojn, teatron, infanzorgejon, lernejojn, teknikan instituton, universitat-urbon, laboratoriojn, klubon, oficejojn, akvoturon, elektran centrejon, esenc-rezervujojn, hospitalon, kooperativon, poŝtejon.

La traktoroj jam estis alvenintaj. Dum la urbo estis konstruata, ili tiris, senlace, ĉirkaŭ la nova urbo grandegajn cirklojn da sulkoj ondsimilaj; k eĉ nokte ili daŭrigis siajn taskojn sub la faskoj de siaj lumigiloj en la virga stepo.

Cent kilometrojn de nordo al sudo, cent kilometrojn de oriento al okcidento. 80 traktoroj, el kiuj 67 estas 60-ĉevalpotencaj k centoj da plugiloj, erpiloj, semiloj. 80 "kombin"-maŝinoj, grandegaj falĉmaŝinoj atendantaj la rikolton, ordigitaj en siaj gardejoj kiel nekonataj militmaŝinoj.

En tia sovĥozo estas investitaj 7½ milionoj da rubloj. 108 000 hektaroj devas esti kulturataj. Armeo el 2000 homoj kun agronomoj, inĝenieroj k 600 studentoj. Loĝado, hejto k lumo senpagaj por la laboristoj. Tri manĝoj tage por 70 kopekoj (ĉ. 0,35 dol.). 8-hora labortago, kvintaga semajno, "ŝtormbrigada" laboro. Unu maŝino priservata de tri altern-laborantoj plugas 100 ĝis 150 hektarojn dum 24 horoj. En la pasinta jaro 22 mil hektaroj estis kulturataj, 96 550 centkilogramoj da greno rikoltataj. Ĉijare, 65 mil hektaroj estas prisemitaj k antaŭviditaj estas 188 550 centkilogr. da rikoltaĵo.

La laboro estas dividita inter 8 "unuoj" (grupoj), kiuj ampleksas de 2500 ĝis 7000 hektaroj. La "unuo numero 3" konsistas el junkomunistoj. Tre malgranda, sed moderna vilaĝo. Vilaĝo-bivako kun dormejoj, pura kuirejo, afiŝ-ornamita manĝejo, laborejoj, semaĵ-tenejo, veturilejoj, banejoj, klubo k biblioteko.

Ĉirkaŭ la mirigitaj malnovaj vilaĝoj la "unuoj" etendas ĝis la senfino siajn paralelajn sulkojn. Kaj la homo, kiu partoprenas en la "socialista konkurado", ne konas pli da limoj ol la vaste etendita ebenaĵo. Jen en la kvina "unuo" la brigado, kiu devis plugi 2 645 hektarojn dum 14 tagoj, plugis ilin dum 9 tagoj. Jen aro da traktoristoj, kiuj devis plugi 150 hektarojn dum 21 horoj k prilaboris 220 dum la sama tempo. Jen la lakteja "unuo" kun sia kozaka direktoro, siaj 2500

DOKUMENTOJ DE KOMUNISMO

Tiu ĉi dokumentaro pri komunista movado entenas ne nur la faman Komunistan Manifeston de Marks k Engels, sed plie la Programon de la rusa komunista partio (bolŝevikoj), la Konstitucion de RSFSR k Manifeston de l' Tria Internacio al la tutmonda Proletaro. Ĝi estas unu el tiaj helpiloj, kiajn oni ofte serĉas sur sia librobreto.

Form. 11×17 cm. 132 pĝ.

Prezo 1.— mk. g.

Mendu ĉe *Administrejo de SAT, Leipzig O 27, Colmstrasse 1 (Germ.)*

hektaroj, 400 bovinoj, 345 porkoj k 750 kokinoj.

Preterpasinte marĉon nun sekigatan, oni atingas unu el la 14 vilaĝoj, kie la laboristoj de l' sovĥozo instruas k helpas per siaj maŝinoj al la kolĥozanoj (kolĥozo = kolektiv-mastrumo, principe kulturata de kamparan-asocioj, kontraste al sovĥozo, administrata rekte de l' ŝtato). Tiel la sovĥozo "Verblud" starigas ĉiuparte kolĥozojn, kiujn ĝi ĉirkaŭprenas per siaj longaj brakoj. 20 kolĥozoj profitas ĝian helpon.

La malnovaj karakterizaj kostumoj de l' vilaĝanoj malaperas; ilin anstataŭas la kitelo k la pantalono de l' laboristo. Junkomunistoj k pioniroj tiras al la Novo eĉ la maljunan "baba", la kamparan-avinon.

Laŭ raporto de Vajan-Kuturje (Vaillant-Couturier) en "La Homaro" (L'Humanité) kompiltradukis N. B.

PRI SUGESTO K MEMSUGESTO

En "S-ulo" kompetentaj Gek-doj ĉiam pritraktis k pritraktas tre interesajn temojn laŭ eduka vidpunkto; k pro tio oni devas rekoni, ke nia gazeto estas bela k taŭga edukilo por la SAT-anaro. Tiurilate mi dezirus k proponas, ke diskuto pri sugesto k memsugesto estu malfermata, ĉar laŭ faritaj spertoj sur mi mem, mi juĝas ĉi tiun temon grava k tre interesa por la edukcelo diversrilate. Se inter la SAT-anaro estas kompetentuloj tiufakaj (k sendube estas), mi dezirus, ke ili diskonigu siajn konojn en nia gazeto.

Unue, la vulgarigo de ĉi tiu temo instruas la regadon super si mem per memsugesto; due, ĝi instruas, kiel oni povas mildigi k eĉ forigi malsanojn aŭ almenaŭ helpi por ke la kuracista metodo estu pli efika. Kompreneble oni ne devas konatiĝi kun ĉi tiu scienco por ĝin utiligi por ĉarlatana celo, nek por malnoblaj praktikoj, ĉar estas memkompreneble, ke tiom ĝi povas utili por la bono, kiom por la malbono.

Bedaŭrinde estas multaj personoj, kiuj ĝin uzas nur por la malbono k aliaj nur por memprofitaj celoj. Ĉi lasta kategorio estas la t. n. "resanigantoj", kiuj, eĉ se ili utilas al malsanuloj resanigante ilin tre ofte, tamen lasas ilin en la nescio pri la kaŭzoj k la fenomenoj, kiuj determinis k kunhelpis al resanigo; anstataŭ klarigi k instrui al paciento, ke la resanigo okazis nur per lia memsugesto, por ke aliokaze li povu resaniĝi mem. Sed la resanigantoj tion ne faras, unue pro timo perdi klienton; due pro timo je konkurenco k trie por esti plue konsiderataj de la naivuloj kiel superhomaj mirakluloj. Sekve multaj personoj post resaniĝo per tia metodo iĝas pli stultaj ol antaŭe, konvinkiĝinte pri tio, pri kio ili antaŭe nur suspektis, sed ne estis plenkonvinkitaj. Unuvorte, anstataŭ antaŭeniri sur la vojo de klerigo, ili malantaŭeniras ĝin. Mi mem, antaŭ ol esti koninta la principojn k la efikon de l' memsugesto, havis okazojn vidi proprokule tiajn resaniĝojn, k ne sukcesante klarigi al mi la aferon, kvankam mi estas konvinkita kontraŭreligiulo k sendiulo, mi preskaŭ kredetis je superhoma forto influanta en la homa estaĵo.

Tiun ĉi ne diskonigitan, sed malnovan kiel la homaro sciencon utiligis k ĉiam utiligas ĉiuj religioj kiel fundamentan bazon por la stultigado al popolo. Precipe la kristana religio baziĝas k klopodas sin teni sur tiu ĉi scienco dank' al la fakto, ke la popolo ĝenerale ne konas la principon k efikon de l' memsugesto. Tiurilate mi opinias necese citi ekzemplojn:

En Sardio, insulo, kie mi naskiĝis, apartenanta al Italio, estas multaj preĝejoj k sanktejoj dissemitaj tra la kamparo, kie en difinita tago, unu fojon dum jaro, miloj da kredantoj pilgrime kolektiĝas por festi la tiean sanktaĵon. Multaj malsanuloj k eĉ kripluloj resaniĝas surloke nur post eldiro de kelkaj stultaj preĝoj. Ĉi tiuj faktoj estas realaĵoj okulvideblaj, okazantaj tre ofte, k oni ne povas ilin nei.

Kiaj estas la misteraj fortoj, kiuj okazigas tiajn resanigojn? — Nur la forto de l' memsugesto. La malsanulo, kiu jam eksciis, aŭ ankaŭ vidis tiele resanigitajn samsortanojn, veturas al la sanktejo kun la konvinko, ke la mirakla sanktaĵo rekompence por liaj preĝoj resanigos lin. Unuvorte li imagas, ke li resaniĝos, k efektive li resaniĝas. Se la sanktaĵo estas anstataŭata de l' diablo k la naiva malsanulo konvinkiĝus, ke ĉi tiu havas la saman kapablon kiel la alia, la rezulto estus la sama. Sed la pastraro ekspluatas ĉi tiujn ne por ĉiuj memkompreneblajn faktojn por stultigi pli k pli la popolon, kredigante al ĝi la diajn miraklojn. Mi citis Sardion pro tio, ke mi konas pli bone ĝian loĝantaron k tradiciojn, sed pli malpli okazas la samo en ĉiu mondparto.

Ofte okazas, ke post resaniĝo per memsugesta metodo (kiel cetere ankaŭ per aliaj metodoj) la malsano revenas; sekve la naivulo konkludas, ke ĝi revenis pro tio, ke la resaniĝo okazis kontraŭ dia volo. Tio estas sensencaĵo. La malsano revenis, pro tio ke ĝia kaŭzo ne estis forigata k ĝi estas elradikigata nur per daŭra praktikado de l' memsugesto. Kaj por tion fari necesas, ke la malsanulo estu instruata, laŭ kia maniero li devas konstante ĝin praktiki. Tio ĉi ne estas malfacila afero: ĝi estas eĉ tre simpla. Tamen nek la pastroj, nek la profesiaj t. n. resanigantoj instruas ĝin pro tio ke, kiel supre dirite, tia instruo ne estas akordigebla kun iliaj interesoj. Ĝi estas deviga tasko plenumenda de edukcela asocio kontraŭreligia kiel SAT. Tial mi opinias, ke malfermo de diskuto tiutema en "S-ulo" ne estas senutila: ĝi eĉ estas tre grava k necesas precipe laŭ vidpunkto de l' forigo k elradikigo de malnovaj stultaj superstiĉoj k por klarigi la okazadon de miraklosajnaj fenomenoj.

SAT-ano 15 973.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

En usonaj karbminejoj

En la karbregionoj de la ŝtato Kentoki (Kentucky) okazas eksterordinara batalo. Pli ol 5000 virinoj k infanoj estas minacataj de malsato. Unuflanke staras la potenca trusto de minejposedantoj, kies minejoj provizis proksimume 12 milionojn da tunoj da karbo lastjare. La minejpotenculoj estas forte subtenataj de la loka policestro, kiu estas tre batalema k kruela.

Kontraŭflanke staras la malsata, ĉifone vestita senlabora proletaro. Dum la minejpolicistoj atakas la laboristojn per maŝinpafiloj k fusiloj, la atakatoj defendas sin per ŝtonoj k klaboj. Pro la pafado k bombardo la vilaĝo komencis bruli k la loĝantoj devis rifuĝi. Sekve de la ĉiama salajrredukto k netolereblaj laborkondiĉoj, la laboristoj ekribelis. Tuj kiam la minejposedantoj eksciis, ke la laboristoj intencas membriĝi ĉe la granda minista organizo, ili maldungis ilin, kiuj nun kun siaj familianoj estas en stato de malsato. Al demando de eminentulo unu el la grandaj mastroj respondis: "Mi volonte redungus multajn laboristojn, kondiĉe ke ili ne membriĝos en la organizo."

Malgraŭ malsato k viv-malsekuro, la laboristoj batalas solidare kontraŭ la sangsoifaj lakeoj de l' kapitalistoj.

A. Rosenbluth (14 651).

El Germanio

Pri la danĝera forto de l' reakcio atentigis okulfrape la manifestacio de l' organizo "Ŝtalkasko" (asocio esence konsistanta el eksmilitantoj), kiu okazis la 31-an de majo en Breslaŭ (Silezio). Ĝin partoprenis pli ol 100 mil

personoj uniforme vestitaj. Laŭ vidpunkto de ekstera politiko ĝi direktiĝis kontraŭ la politiko de Polio, dum laŭ internpolitika konsidero ĝi estis provoko al la klasbatala proletaro. La faŝistoj paradis antaŭ la eks-kronprinco (kiu posedas kastelon en Silezio), eks-armeestro Makenzen k la eksreĝo de Saksio! —

Okaze de la malfermo de l' kongreso de la Socialdemokrata Partio en Lajpcig okazis strata manifestacio, en kiu partoprenis ĉ. 100 000 personoj k paroladis ankaŭ oratoroj de eksterlandaj soc. partioj. Opozicio, kiu ĉe la kongreso kritikis la sintenon de l' partiinstancoj k parlamentana plimulto rilate al la registaro Bruning, estis reprezentita per relative malmultaj delegitoj. —

En Hamborn okazis akraj interbataloj inter laboristoj k policistoj, kaŭzitaj de verdikto, kiu kondamnis kelkajn proletojn al plurmonata malliberiga puno, pro tio ke laŭdire ili gvidis atakon de senlaboruloj kontraŭ la urbdomo. La policistaro ne sukcesis senhomigi la stratojn, tamen repremante la amason ĝis la lab. kvartaloj, kie la rezisto estis pli forta k la laboristoj sin defendis per barikadoj k pavimŝtonoj. Ankaŭ en pluraj aliaj urboj de la Rur (Ruhr)-regiono (Boĥum, Duisburg, Essen) okazis similaj interbataloj.

R. J.

Por la strikantaj norvegaj gelaboristoj ni ricevis de la Alĝera Esperantista Grupo la sumon de 40 fr. fk., kiu estas sendita al la koncernatoj.

Adm. de SAT.

Abortiga paragrafo k senlaboreco

La problemo pri popol-plimultiĝo jam ĉiam okupis pensantajn kapojn. Unu el la plej famaj, la angla naciekonomiisto J. R. Maltus (1760—1834) starigis la leĝon, ke la loĝantaro havas la tendencon plimultiĝi pli rapide ol la nutraĵoj necesaj por ĝia konservo. Laŭ tiu ĉi vidpunkto oni povus konkludi, ke limigante la infanproduktadon, ĉiu mizero en la mondo povus esti forigata. Ni socialistoj ne konsentas al tiu ĉi opinio. La ekspluatado al la homo fare de la homo — k kun tio la necerto de l' ekzistado k dependeco de la homoj nur povantaj vendi sian laborforton — estos tiel longe kiel la kapitalismo estas la reganta ekonomisistemo.

Ni vivas en epoko de la raciigado. Kial ne ankaŭ raciigi, t. e. racie reguligi la naskiĝojn? Ju pli ŝpareme la laboristaro produktas la posteularon, des pli la kapitalistoj ĝin devas trakti zorgeme por ne pereigi la laborforton, la fundamenton de sia ekzistado, tiel frivole kiel dum la mondmilito. Se la kapitalista produktmaniero ne estus tiel konfuza, se ĝiaj reprezentantoj k profitantoj nur iomete povus forlasi sian idearon, ili mem helpus akceli la gigantan kataklismon en la metodoj de la popol-plimultiĝo. Ĉar kion la kapitalistoj povus deziri pli multe ol riĉan, senĝenan debiton al aĉetema k pagpova aĉetantaro?

Hodiaŭ la infanriĉa familio bezonas la tutan salajron por nutraĵoj. La edzo dum jaroj estas vestita per mizera vestaĵo, apenaŭ la porlabora vesto povas esti ĝustatempe anstataŭata. La edzinon k la infanojn koncernas la samo, ĉie mankas la plej simplaj vivbezonaĵoj. Se la laborulamasoj hodiaŭ povus aĉeti, kion bezonas la kulturhomo, ni havus bonan konjunkturon (ekonomian cirkonstancaron) dum multaj jaroj. Malgranda familio nutranta nur unu aŭ du infanojn — mi supozas profitdonan laboron por la edzo — povas aĉeti multe pli da industriaj produktoj ol infanriĉa familio. Sed la kapitalistoj pensas aliel. Ilia regado baziĝas sur la malsato de la amasoj. La rezerv-armeo de la senlaboruloj obeigas la laborantojn multe pli bone ol polico, armeo aŭ juĝistaro ĝin povas. Ne nur ke ili forprenas de la laborantoj la kuraĝon al postulo de salajr-altigo, sed ankaŭ tiurilate ĉar la laboristaro havu la senton, ke ĝi estas superflua k tial estu kontenta, se ĝi havas okupon ajnan. Sed se per racia loĝantar-politiko malaperus tiu trooferto k maloftiĝus la laborforto, tiam, direktante sin laŭ la merkata leĝo, laŭ

La ekonomia penetrado de Usono en Centran Amerikon

(2. daŭrigo. Vd. n-ojn 348, 349)

III. La ekspansiaj metodoj

Ni citu kelkajn ekzemplojn, observante aparte, por pli granda klaro, la agadon de la grandaj bankoj k la agadon de l' trustoj, kvankam tiu dividiĝo estas, koncerne la agadon de Usono en Centra Ameriko pli teoria ol reala, ĉar la interesoj de la bankoj k de l' trustoj pri ĝi estas rigore intermiksataj:

a) *La penetrado de la bankoj.* — La fama amendamento Plat (Platt) en 1901 signis la unuan komencon de la granda politiko de financa k ekonomia ekspansio de Usono en latinan Amerikon.

Se, konforme al la traktato de Parizo, usonanoj retiriĝis de Kubo, tio okazis nur tiel ke ili certigis al si la regadon super la insulo. Dank' al kondiĉoj de la amendamento, la "Nacia Civita Banko de Nov-Jorko" tie investis 1 miliardon k kvaronon da dolaroj k estis tiel la precipa direktanto de la pli granda parto de l' produktaj riĉaĵoj en Kubo.

Admirinda ekspansia ilo, la amendamento Plat servis kiel modelo por preskaŭ ĉiuj traktatoj, kiujn Usono devis kontrakti kun malgrandaj ŝtatoj de Centra Ameriko.

Ĝi uzis ĝin unue por Sankta Dominiko (San-Domingo). Oni scias, ke Sankta Dominiko, kies politikaj malpacoj k financaj malordoj estis nekredeblaj, ŝuldantiĝis ĉe nederlanda kompanio, kiu, en 1893, akiris la privilegion kolekti ĝiajn doganimpostojn. Tiuj impostoj estis aĉetitaj de la "Sankta Dominika Plivaloriga K-io" de Nov-Jorko, k, ĉar la malbona mastrumado de la dominika registaro estis daŭranta, la ŝtat-departemento, kies ministro estis Johano Hej (Hay), pretekstis eblan enmiksiĝon de eŭropaj kreditoroj k elŝipigis soldataron. Usona altranga ŝtatoficisto estis kompreneble komisiata pri administrado de l' doganoj. 45% de la rentoj estis por la dominika registaro k 55% estis difinataj por likvido de la ŝuldo.

Dum pluraj jaroj, la usona enmiksiĝo havis bonegajn rezultojn — laŭ kapitalistaj ekonomiistoj — k pliigis konsiderinde la insulan komercon, kiu transiris de 6 milionoj da dolaroj en 1906 ĝis 20 milionoj en 1912. Ĉar la lando restis en malpaca stato, Vaŝingtono sendis, en 1915, depeŝon por postuli la kontrolrajton super la tutaj financoj k super la armeo. Ĉar estis plej evidenta protektorato, la prezidanto de l' Respubliko de Sankta Dominiko rifuzis. Pretekstante la protekton de sia ambasadorejo, usonaj soldatoj elŝipiĝis, konstatis, ke Sankta Dominiko rompis financajn kontraktojn, eksigis perforte la prezidanton k starigis "sieĝan militan staton, ne por detrui la suverenecon de la lando, sed por certigi la ordon".

Ekzistas frapanta paralelo inter la usonaj pruntoj k la enmiksiĝoj de Usono. Apenaŭ estis kontraktita la traktato de 1905, ke prunto de 16 milionoj da dolaroj estis trudata de la bankoj por entrepreni publikajn laborojn k esti kapabla elpagi la ŝuldon. En 1918, unu jaron post la komenco de la milita okupo, prunto de 4 250 000 dolaroj estis kontraktita. En decembro 1920, post ĉesigo de l' milita reĝimo,

kiu la oferto de varo difinas la prezon, la proporcio renversiĝus. La laboristaro konsciiĝus pri sia fakta valoro k povus supreniri ne malhelpite de la plumba pezo de la senlaborula rezervarmeo.

La paragrafo 218 (144 en Aŭstrio) de la germana punkodo malpermesas la abortigon de l' feto. Oni povus konsenti al tiu ĉi paragrafo, se ĝi ekzistus nur por protekti la virinojn kontraŭ gravaj korpaj domaĝoj, kvankam ja estas preskaŭ certe, ke perkuracista abortigo estas nedanĝera. Sed tio ne estas la opinio de la "leĝdonantoj". Ili havas intereson devigi la virinojn naski infanojn ankaŭ tiam, kiam ili ne deziras ilin k povas pruvi, ke la familio ankoraŭ plimizeriĝas. Se estus aliel, tiam la leĝdonantoj faciligus al la virinoj uzi gravediĝ-malhelpilojn. Tute kontraŭe! La § 184 de la germ. punkodo, kiu temas pri la kolportado de malĉastaj skribaĵoj, bildoj k objektoj, oni interpretis tiel, ke ĝi ankaŭ malpermesas la oferton, ekspozon k anoncon de tiaj gravediĝ-malhelpiloj. La rezulto estas nekono de tiaj taŭgaj rimedoj en la amaso k sekve la abortigo kun siaj multaj viktimoj inter virinoj k knabinoj ĉiujare.

17 245 (Linz).

FABELOJ de Hermynia Zur Mühlen
Kion rakontas la amikoj de Peĉjo
Prezo 0,60 gmk. — 56 pĝ.
Administrejo de SAT,
Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

KONTRAŬ LA DOGMOJN

Animkredo

(1. daŭrigo. Vd. n-on 347)

Estas rimarkinda fakto, ke la primitivulo imagas la animon tute palpebla k neniam kiel nematerian estaĵon. Kion li ne povas vidi per okuloj, aŭdi per oreloj, flari per nazo, gusti per lango, palpi per palpiloj, tio ne ekzistas por li. Kredante la animon kvazaŭ movanta forto, li serĉas ĝin en sia korpo tie, kie regas precipe palpebla movado. Tia movado okazas ĉe tiuj lokoj, kie pulsadas la pulsoj, t. e. unuavice tempioj, kolo k koro. La movadoj ĉe tiuj lokoj efektiviĝas sendepende de lia volo, k pro tio baldaŭ li atentas pri ili. En plej alta grado lia atento ekscitiĝas per rapida movado, t. e. ĉe forrapido aŭ postkuro la malamikon. Tiaokaze la pulsoj, speciale la korpulso, martelas tiom fortike, ke la travivanto devas percepti ĉiun pulson kiel memstaran "vivospiriton". Se homo estas mortinta, liaj familianoj konstatas la malaperon de ties pulsoj, k estiĝas sekvanta koncepto: Ĉi tiu homo mortis tial, ke liaj vivospiritoj (la pulsoj) foriris el la korpo. Efektive la vero estas tute alia: Pro internaj kaŭzoj ĉesis la vivfunkcioj, do ankaŭ la pulsmovadoj. La sovaĝulo tute kompreneble interŝanĝas kaŭzon per efiko, ĉar li ja neniel konas la funkciajn interrilatojn k rimarkas nur la rilaton inter vivo k pulsoj. Ni ne forgesu, ke ĉi tiuj bazaj spertfaktoj rilate al vivo k morto troviĝas senŝanĝe ĉe ĉiuj popoloj, k tial estas samaj la kredoj je la vivoforto en ĉiuj esencaj trajtoj. Akcenti ni volas, ke laŭ primitiva kredo pluraj animoj regas la korpon, ekzemple tiom, kiom ekzistas da pulsoj, k nur je pli alta grado de evoluo oni resumas la diversajn vivospiritojn kiel unu animon.

Kiel mi jam diris, por la primitiva homo ĉiuj per la naturfortoj movitaj aĵoj estas animitaj. Ventoj k nuboj, riveroj k maroj, fajro k fumo, pluvo k neĝo, ĉiuj falantaj k ruliĝantaj objektoj, fine ankaŭ la astroj, ili ĉiuj posedas animojn. Tial ke ĉiu ajn objekto povas esti movita k movota, kelkaj popoloj havas ideon, kiu iom alproksimiĝas la nunan ideon pri universa animo; la ĉefa diferenco konsistas el tio, ke ĉi tiuj popoloj kredas animon de ĉiu unuopa objekto; male, laŭ modernaj metafizikaj doktrinoj, unu sola mondanimo trapenetras la tutan universon k disvolviĝas en grandnombraj plej divers-specaj objektoj. La plejmulto da naturpopoloj ja ne estas anoj de tiu "individua animo tutmonda"; kontraŭe kelkaj popoloj kredas je ekzisto de animoj nur por difinita *klaso* da homoj, do ne jam por ĉiuj homoj. Entute oni devas kompreni, ke koncerne la specialan kvaliton de l' animideo ni renkontas gravegajn diferencojn jam inter la diversaj primitivaj popoloj; krome la imagoj pri la animo eĉ interne de sama popolo entenas sennombrajn

la ŝtatdepartemento traktadis konvencion pri forsendo de l' soldatoj; en tiu konvencio estis supozata "la valido de la lasta prunto de 2 500 000 da dolaroj, minimuma k necesa sumo por kompletigi la konstruajn publikajn laborojn k fundamenta por la bonstato de l' dominikana popolo". Tiuj pruntoj produktis 8% al obligaci-posedantoj, principe, sed en la realo difinitaj klaŭzoj plialtigis tiun procenton, kiu atingis sumon de 14%.

Aliparte, la rilatoj inter la bankoj k ŝtatdepartemento ekvidiĝas tute speciale en la cirkuleroj, kiel tiuj de "Spajr k Kio" (Speyer and Co) k de "Nov-Jorka Egaleca Trusto" (Equitable Trust of New-York) de 20-a de junio 1921, kiu citis leteron senditan al "Egaleca Trusto" de la estro de la financa ministerio de l' milita usona registaro starigita en Sankta-Dominiko. Ĝi montris, ke la usona registaro garantiis la prunton, ĉar ĝi certigis al akciuloj, ke la soldataro estu forsendita nur post la oficiala konfirmado de ĉiuj agoj faritaj de l' militistaj aŭtoritatuloj, k ke la rajtoj de l' ĝenerala kasisto de l' doganoj estu daŭrigataj ĝis la pago de l' kontraktitaj obligacioj.

Samaj metodoj en Haitio. Traskuata de kronikaj revolucioj k plendeginde mastrumata, Haitio ŝuldantiĝis tre rapide. La usonaj bankoj insiste petis la ŝtatsekretarion Noks (Knox), por ke li nepre postulu, ke la interesoj de Uol Strit (Wall Street[1]) estu reprezentataj en prunto, kies pli granda parto estis monoferita en Francio, por fondi la Nacian Bankon de Haitio. Poste, dum la granda milito, la "Nacia Civita Banko de Nov-Jorko" aĉetis preskaŭ ĉiujn akciojn k tiel, estrante la Nacian Bankon, regis super la ekonomia vivo en Haitio.

La Nacia Banko havis en rezervo 550 000 dolarojn, kiuj parte servis kiel garantiaĵo por ĝiaj kreditoroj k konsistigis bankrezervojn. La prezidanto Zamor, bezonante monon, volis ilin alproprigi al si. Vaŝingtono tiam sendis krozŝipon, kiu perforte prenis tiujn monrezervojn k ilin kunportis al Nov-Jorko, kie ili estis enŝlosataj en la monŝrankoj de la "Nacia Civita Banko". Ĉar la prezidanto Sam rifuzis traktaton proponitan de Ŭilzn (Wilson), kiu protektante Haition kontraŭ ties kreditoroj, samvaloris kiel protektorato, malpacoj rekomenciĝis. Prezidanto Sam estis senkompate mortigata de la popolamaso k la usona okupado komenciĝis; la doganoj estis mastrumataj de reprezentanto de Usono. Pli poste, la bankoj trudis al Haitio prunton de 1 111 000 da dolaroj, kies rentumo estis tre alta. Sed la malnova konstitucio de Haitio malpermesis al fremduloj akiri bienojn. Tio estis grava malhelpo por la grandaj kompanioj, kiuj volis ekspluatadi tre riĉan teritorion. Tial la okupadestraro redaktis novan konstitucion, kiu estis akceptita de Haitio post tre granda kontraŭstaro.

Kompil-tradukis M. Roux (132).

(Daŭrigota.)

[1] Usona financkapitalo.

Belega romano! JACK LONDON
LA FERA KALKANUMO
Tradukita el la angla de G. Saville.
368 paĝoj. Formato 12×18 cm.
Prezo 2,60 mk. g., (bindita 3,50 mk. g.)
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, aŭ Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

kontraŭdirojn, ĉar mankas scienca penso al sovaĝulo. (Daŭrigota.)

Kristo instruis — la estraro interpretas . . .

Laŭ la evangelio de Kristo "ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ Dio"; kiel tiun belan maksimon interpretis k interpretas la reprezentantoj de dio sur tero, estas konate. Jen mi donas novan ekzemplon de mi mem observitan. En malgranda loko Kaŭern (ĉ. 550 loĝantoj) en la germania provinco Silezio dispartigis la preĝej-estraro la 17-an de majo 1931 la sidlokojn en la preĝejo por siaj fideluloj. Por ĉiu estis difinita speciala loko, sur kiu oni povos legi la nomon de l' koncerna preĝej-vizitanto. Sed la eklezia konsilantaro tute ne zorgis pri apliko de la Krista instruo pri egalrajteco: laŭ sia bona klasa konscio ĝi donis al la "vilaĝaj nobeloj" (riĉuloj k eminentuloj) la plej bonajn lokojn, tre zorge apartigitajn de l' fiproletaj vizitantoj — la malriĉuloj ja povas serĉi mem sidlokon, se restas ankoraŭ por ili tia. Kelkaj proletaj virinoj tamen ekpripensis k priplendis la aferon; espereble ilia ekribelemo kondukos ilin al la sole ĝusta solvo: eksiĝi la eklezion k turni la dorson al la pastraro.

(10 634)

TRA ESPERANTIO

INTERNACION AŬ SENNACIECAN ASOCION?

La demando, ĉu ni proletaj esperantistoj estu organizitaj pere de naciaj asocioj en Internacio aŭ en sennacieca asocio tutmonda, refariĝis aktuala. Jam depost la ekzisto de SAT ĉi tiu temo ja estas sufiĉe ofte k detale diskutata. Tamen ŝajnas, ke multaj Gek-doj ne komprenas aŭ ne volas kompreni, ke por klaskonsciaj laboristaj esperantistoj la organizmaniero de SAT estas la plej konsekvenca k taŭga. Ni ja lernis esp-on por ĝin meti je la servo de l' proletaro. Por nacia bazo ni ne bezonus mondlingvon, ĉar kun samlandanoj ni povas interkompreniĝi per gepatra lingvo. Por ni laboristoj estas tre grava la fakto, ke ni povu interkontaktiĝi *senpere* kun niaj samklasanoj el la tuta mondo. Nur tiel la fama devizo "Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu" ne plu estos senviva surpaperaĵo. En la verketo "For la neŭtralismon!"[1] K-do Lanti prave skribis:

"Ni ne estas malhelpataj de la lingvaj baroj; ni ne havas similan taskon, kiel tiu de la 'Internacioj'. Se do ni imitus la ĝisnunan organizmanieron, ni kvazaŭ similus al homo, havanta aŭtomobilon, kiun li trenigas per ĉevalo."

Bedaŭrinde ni devas konstati, ke la diversaj Internacioj ĝis nun ankoraŭ malatentis la mondlingvan problemon. Ni bezonos pruvi per faktoj dum anties aŭtoritathavantaj gvidistoj ŝanĝos sian sintenon antaŭ la esperanta afero. Ni bezonas pruvi per faktoj dum ankoraŭ longa tempo, ke esperanto vivas k utilas praktike. Kaj tion ni povas fari nur per la unuiĝo de ĉiuj proletaj esp-istoj en organizo, kiu ebligas senperan kontakton inter la membroj. SAT estas tiu organizo k la *internacia* formo de organizo ne estas taŭga nek celkonforma.

Sed strange, kvankam oni devus konjekti, ke laboristaj esp-istoj, por kiuj la lingva baro ne plu ekzistas, ignorus la naciojn en sia organiziĝo, domaĝe estas fakto, ke ili faras la kontraŭon. La sopirega celado de socialistoj depost longa tempo jam estas fondi socialistan esp-istan Internacion. La denovan konfirmon mi bedaŭrinde ricevis leginte en "S-ulo" n-o 346, pĝ. 271 la rezolucion akceptitan de la 10-a Plenkunveno de aŭstria laborista ligo esp-ista (ALLE). Ŝajnas plie, ke la SAT-opoziciularo celadas imiti *kaŝe*, kion kelkaj socialistoj dum jaroj senkaŝe rekomendis. Ĉu la proletaj esp-istoj nenion lernis de la historio? Ĉu ili ne komprenas la gravan signifon de la fakto, ke ili *estas mondlingvanoj*, ke lingvaj baroj ne ekzistas inter ili? Ĉu do blinde ili volas ĉiel imiti siajn politikajn gvidistojn, kiuj nur ridetas ĉe la aŭdo de la vorto esp-o? Ĉu la esp-istaj leninistoj mallernos esp-on, tial ke Lenin opiniis, ke nia lingvo estas netaŭga, k artefarita lingvo estas utopiaĵo? Multajn similajn demandojn mi emus fari k ankaŭ montri, ke oportunismo k filistreco ofte sin kaŝas sub patose rrrevoluciaj frazoj.

Ulo (11 067).

[1] Havebla ĉe la Administrejo de SAT.

Raporto pri la stato de "Sennacieca Pedagogia Revuo"

Pluraj K-doj sin turnis al ni por ekscii pri tio, kio okazas kun S. P. R. Tial ni petis al la redaktanto, K-do Stej, ke li bonvolu informi nin. Publikigante la suban raporton, ni emus fari komentojn; ni tamen tion ne faros k lasos al la legantoj la zorgon mem fari k noti bone en la memoron la f a k t o j n. *Direkcio.*

La maŝinskribita materialo por sep n-oj, el kiuj kvar estas presitaj, estas ekspedita al Moskvo laŭ jena tabelo:

N-o 1, kun surpresita dato — marto 1930 (respondecis K-do M. Bubu; materialo ekspedita ?), aperis aprilon 1930.

N-o 2, majo 1930, ekspedita 8. 3. 1930, aperis julion 1930.

N-o 3, julio 1930, ekspedita 9. 5. 1930, aperis aŭguston 1930.

N-o 4, ?, ekspedita 14. 8. 1930, aperis ?.

N-o 5, por sept.-okt., ekspedita 11. 11. 1930, ankoraŭ ne aperis.

N-o 6, por nov.-dec., ekspedita 27. 12. 1930, ankoraŭ ne aperis.

N-o 7, por jan.-feb. 1931, ekspedita 31. 1. 1931, ankoraŭ ne aperis.

Materialo por pliaj n-oj ne estas preparita, ĉar post n-o 4-a (kies ekzempleron la redaktanto ankoraŭ ne ricevis), neniaj kajeroj aperis.

Estas ekspedita al Moskvo la maŝinskribita materialo de 35 artikoloj por n-o 5, de 35 artikoloj por n-o 6, k de 25 artikoloj por n-o 7, akompanata de 3 fotoj kun klarigaj tekstoj pri ateista *Lavra* en Ukrainio. Ĉi tiuj 95 artikoloj k 3 fotoj tute ne estas presitaj.

28. majo 1931.

H. Stej (2978), Redaktanto.

★ XI. Kongreso de SAT en Amsterdam (Nederl.)

2.–7. aŭgusto 1931.

3. listo de aliĝintoj

73.	Luker, D.,	Wolverhampton (Anglio),	8502
74.	Burbey, L.,	Leeds (Anglio),	8048
75.	Harris, S.,	„ „	11072
76.	Soloman, A.,	„ „	13856
77.	Zachte, E.,	Amsterdam (Ned.),	14562
78.	Stöckl, M.,	Innsbruck (Aŭstrio),	6826
79.	Spitzenstätter, A.,	„ „	14551
80.	Dekker, R. A.,	Amsterdam (Ned.),	3883
81.	Buna, G.,	Düsseldorf (Germ.),	3789
82.	Schmidt, E.,	Weissenfels „	9107
83.	Löbel, R.,	Burkhardtsdorf „	8282
84.	Kassner, R.,	Rathenow „	15036
85.	Elze, O.,	Halle „	5312
86.	Elze, M.,*	Halle „	6152
87.	Wild, J.	Schlieren (Svisio),	9542
88.	Inemannova,	Plzen (Ĉeĥoslov.),	17316
89.	Clayton, H., j.,	Sheffield (Anglio),	2877
90.	Planchon, M.,	Sucy (Francio),	1380
91.	Habert,	„ „	55
92.	Rosell, J. G.,	Stockholm (Svedio),	17319
93.	Rosen, E.,	Slöinge „	15511
94.	Eriksson, E.,	Stockholm „	11020
95.	Matthews, C.,	st. Albans (Anglio),	11664
96.	Matthews, L.,*	„ „	15737
97.	Deacon, A. C.,	„ „	16431
98.	Flower, J.,	Londono „	3398
99.	Canton, M.,	Londono „	
100.	Roosing, A.,	Zeist (Ned.),	13607
101.	Kerr, J. M.,	Denver, (Usono),	1781
102.	Joiber, J. M.,	„ „	5934
103.	Barta, R.,	„ „	8207
104.	Klatil, E.,*	Amsterdam (Ned.),	16992
105.	Klatil, A.,	„ „	16961
106.	Boxem, F. J.,	„ „	16840
107.	v. Stek, J.,	„ „	13599
108.	Pamphilon, G.,	Londono (Anglio),	14992
109.	v. Essen, M.,*	Marken, B. (Ned.),	10287
110.	v. Essen, G.,*	Marken, B. (Ned.),	15974
111.	Villard, J.,	La Chapelle (Franc.),	11774
112.	Robert, E.,	Le Rainey (Francio),	741
113.	Glodeau, S.,*	Paris „	3792
114.	Glodeau, L.,	Paris „	50
115.	Chisholm, W.,	Edinburgh (Skotl.),	12215
116.	Cooper, J. H.,	Sheffield (Anglio),	17185
117.	Burrell, J. C. E.,	„ „	16925
118.	Wilson, E.,	Halifax „	16340
119.	Ŝuh, V.,	Neumer (Ĉeĥoslov.),	6082
120.	Göppner, A.,	Leipzig (Germ.),	10614

* estas K-dino.

Proponoj al la XI-a Kongreso

1

La Kongreso decidu: 1. La unujara membreco estas likvidata k anstataŭata per kvaronjara membreco. 2. La kotizo estu po kvaronjaro por membroj-abonantoj 2,65 mk. g., por pasivuloj, samfamilianoj, favorĝuaj aktivuloj (mizeruloj) 0,65 mk. g. Membroj, kiuj libervole pagas por tuta jaro, pagu la ĝisnunajn kotizojn. 3. En la jarlibro oni ne distingu la membrojn laŭ aktiveco k pasiveco, sed ĉu ili scipovas esp-on aŭ ne.

La aktivaj SAT-anoj de Einsiedel k ĉirkaŭaĵo: 11 297, 7811, 11 298, 13 548, 16 963, 16 964.

Motivigo: Ekzistas niascie nenia alia prol. organizo, kiu havas tian tro vaste fiksitan membrecon kiel SAT. Ĉiu de ni konata organizo havas minimume monatan membrecon. Nia nuna sistemo vere malhelpas al multaj lab. esp-istoj la aliĝon al SAT. En la nunaj mizeraj vivcirkonstancoj nur per oferemo oni povas pagi por tuta jaro kotizon tiel altan, kiu estas preskaŭ ⅓ de semajna salajro, ofte eĉ pli. Ne plu estas tolerebla, ke proletoj forpruntu sian monon al organizo por tuta jaro, ne sciante, ĉu por sia mono ili ricevos dum tuta jaro ekvivalenton. Ni ne scias, ĉu ni post 2—3 monatoj ankoraŭ povos esti membroj de ĉi tiu organizo, kiun ni subtenis por tuta jaro per nia de buŝo forrabita pano. Ni ne scias, ĉu faŝismo ie superos k malpermesos nian organizon k eble enspezos *nian* monon. Ni ne scias, ĉu SAT fariĝos burĝa organizo, same ni ne scias, ĉu ĝi fariĝos pure komunista, sed en ambaŭ kazoj granda parto de nia membraro perdus sian monon al organizo, kiun ĝi ne plu volas subteni, aŭ kiu ne plu estas subteninda. Tutjara membreco ne estas racia. Ni spertis en nia distrikto, ke multaj nur tial ne rekotizis, ĉar ili ne volas financigi estontan, ne jam konatan SAT-direkcion. Ofte ne povante pagi per unu fojo, ili, ne havante saman rajton kiel malpli malriĉaj, rifuzas fiere peti pro "favorrajta" aktiveco humile ĉe peranto. Ili ne volas donacon, sed postulas sian rajton; ili ne estas kulpaj pri la mizercirkonstancoj, kiuj malpermesas tutjaran pagon. — La Admin. eldonu kotizmarkojn en formato 14×8 mm por ĉiu kvaronjaro; tiel jare oni bezonas nur unu kampon en la membrolibro. Nur dum la ¼-jaro, dum kiu oni pagis aktivul-markon, la membroj povos partopreni voĉdonojn, ktp. Ni aldonis parton 3 al la propono, ĉar multaj ne povas aboni "S-ulo"n, sed ankaŭ ne volas peti favor-aktivecon k tial multaj vere aktivaj esp-istoj fariĝas pasivaj. Faciligu al proletoj-malriĉuloj aliĝon al SAT! (*11 297.*)

2

Se iu esp-ista grupo el SAT decidas partopreni en la unuamaja manifestacio, estas nepra devo por ili porti standardon, kiu montras pri nia *politika neŭtraleco,* k ke *nia movado en si enhavas ĉiujn politikajn tendencojn.*

J. H. Fingal (13 781).

(La aŭtoro aldonis al sia propono sufiĉe longan motivigon, kiun ni ne povas presigi pro spaco limigita, sed kiu estos laŭtlegata k defendebla ĉe la Kongreso.)

Ĉu en via biblioteko jam troviĝas la originale verkita volumeto:

RUĜO KAJ BLANKO



Rakontoj, epizodoj el la sovetia nuntempo k pasinto de

Ivn

La vigla rakontmaniero allogos k kontentigos vin.

68 paĝoj. Form. 11×14.

Adm. de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

VOĈOJ EL SOVETIO

"Fragmento el protokolo de kunsido de la sekretariaro de CK de SEU, la 18-an de aprilo 1931:

— — — — — — — — — — —

"*4-a demando.* Pri membroj de SEU, kiuj, laŭ venintaj sciigoj, havas interligojn kun la reformisma (??!!) SAT-gvidantaro — k pri iliaj respondoj ricevitaj de ili post demandoj pri ilia pozicio rilate al nuntempaj direktoj de SEU k de SAT.

"*Decido.* a) Klarigojn de K-do Fedotov (Kiev), kiuj montras, ke li foriras de siaj antaŭaj pacemaj opinioj rilate al la direkcio de SAT, konsideri kiel kontentigajn.

"b) Klarigojn de Ŝĉegolev (Barnaŭl), kiuj konstatas, ke esp-ista movado en Barnaŭl disfalas, konsideri kiel jesigon de la jam delonge montrita de CK de SEU danĝero, ke la movado en Barnaŭl, kiu baziĝas ne sur la principa linio de SEU, sed sur propagando de sennaciecaj ideoj de Lanti, ne povas akordiĝi kun soveta laborista socіularo k tial estas destinita, inter kondiĉoj de soveta konstruado, al fiasko. Agnoski la klarigojn de Ŝĉegolev kiel malkontentigajn, sed pro malproksimo de Moskvo al Barnaŭl la CK lastfoje atentigas K-don Ŝĉegolev, ke lia persisto el-SEU-igos lin. La demandon pri K-do Ŝĉegolev ankoraŭfoje pridiskuti en CK post ricevo de sekvonta respondo de li. K-do Gavrilov estas komisiita skribi leteron al Ŝĉegolev k montri al li la multfojajn admonojn de CK de SEU pri malĝusta linio de la Barnaŭla organizo, faritajn prese k perletere.

"c) Klarigojn de Kapustin konsideri kiel informon.

"d) Komisii K-don Potapĉik esplori pri pozicio de Goldfeder[1], kiu nuntempe loĝas en Ĥarkov.

"e) Demandi klarigojn pri daŭranta kunligo kun Lanti ĉe Vasilĉenko (Krasnodar), Konovalov (Niĵni-Novgorod), Semenĉenko (Veliki Burluk)[2].

"*Karaj Gek-doj!* Okaze de tiu ĉi fragmento oni povas fari kelkajn konkludojn pri faroj k vortoj de iuj gvidantoj de esp-ista movado. La opozicio k gvidantaro de SEU postulas liberon en SAT (la kriaĉoj jam estas sufiĉe konataj al vi) k mem subpremas ĉiun liberan penson. Oni volas neniigi SAT, kvankam oni ĉiam parolas pri emo konservi ĝin, ĉar la opozicio komprenebla devas fariĝi nova organizo kontraŭ al SAT, k oni ne hontas samtempe postuli superrajtojn en SAT. Sed, K-doj, multaj esp-istoj bone komprenas la esencon de la opoziciaj fabeloj k spirite estas ĉe vi. Bedaŭrinde ni, sovetaj esp-istoj, havas nur unuflankan informon pri la stato de l' aferoj. Unuopajn n-ojn de 'S-ulo', kiuj venas al ni okaze, ni legas kun granda intereso. El n-oj, aperintaj en 1931, mi havas nur tri. Sed tiom pli karaj estas ili . . .

". . . Nun, karaj Gek-doj, mi finas. Sendu al mi kelkajn n-ojn de 'S-ulo' laŭ sekvanta adreso (sekvas adreso ktp.) . . . Kun kara, kamaradeca saluto via . . ." ". . . 27-V-31."

*

". . . Mi persone faris ĉion laŭ miaj fortoj por subteni "LNE". Miaj korespondantoj pagis por mi du jarabonojn al "LNE". Sed . . . ĝis nun mi havas nur du kajerojn de via revuo. Kontraŭ la sorto oni nenion povas fari. Mi petas, bonvolu ĉesigi la sendadon de la revuo, ĉar regule ĝi trafas . . . en malplenan spacon. *(Ĉi tie sekvas tre interesa parto, kiun ni bedaŭrinde ne povas publikigi, tial ke ĝi konigus la verkinton)* . . . Do, finante ĉi skribaĵon mi volas esprimi al vi mian koran dankon pro la senditaj gazetoj. Ili estis por mi efektive, kiel freŝa blovo, kiel fenestreto en la eksteran mondon . . .

Do, kamaradece via . . ."

28/V. 31.

Nia komento: *Danĝeraj malamikoj de Sovetio troviĝas en Moskvo mem. Tio estas klara por ĉiu pripensema homo. Ĝenerale ekzistas ĉe la esperantistoj la emo — malprava — identigi*

[1] Ĝenerala Konsilanto de SAT, loĝinta antaŭe en Barnaŭl, kie li plej sukcese propagandis.

[2] Tre interese estas noti, ke tiuj K-doj ĉesis havi rilatojn kun Lanti eĉ antaŭ la X-a Kongreso!!! . . . Feliĉe, ke la K-doj el Sovetio, kiuj aprobas nian agadon, estas multe pli multnombraj ol supozas la nuna CK. de SEU k kelkaj estas preskaŭ herooj, ĉar ili daŭrigas interrilati kun ni malgraŭ la Drezena teroro. — *Red.*

VARBKONKURSO AL "S-ULO"

Novaj rezultoj:

Varbis **5** aktivajn membrojn: K-do *Erwin Becker,* Weigelsdorf (Germ.), **4** aktivajn membrojn: K-do *A. Teufelsbrucker,* Linz (Aŭstrio), **3** aktivajn membrojn: K-doj *Paul Limnell,* Ullersäter (Svedio), *F. G. Kroonder,* Amsterdam (Hol.), **7** kvaronjar-abonojn: K-do *Jos. Crispin,* Blackburn (Anglio), **3** kvaronjar-abonojn: K-do *J Brauckmann,* Zilk ĉe Hillegom (Hol.).

Kie restas la aliaj konkurs-partoprenantoj? Ĉiuloke, Gek-doj, imitu suprajn varbantojn k sendu viajn rezultojn (kun samtempa monpago) al la Administracio sub la titolo: "VARBKONKURSO AL 'S-ULO'!"

Sovetion kun CK de SEU. Nu, kion ili pensas ĉe la konstato, ke "S-ulo" k. a. SAT-eldonaĵoj estas tie malpermesataj? Ili certe ricevas de tio tre malbonan impreson k sendube multaj faros erarajn konkludojn.

Por ŝirmi sin mem antaŭ la Sovetia esperantistaro kontraŭ niaj ĝustaj kritikoj, la ĝenerala sekretario de SEU denuncis nian gazeton kiel "kontraŭrevolucian" organon. Ni bone komprenas, ke la Soveta Potenco havas pli gravajn zorgojn ol esplori, ĉu tiu denunco estas ĝusta aŭ ne. Tial la nuna situacio povas ekzisti; tial la esperantistaro ekstersovetia povas esti erarigata pri la veraj kondiĉoj en Sovetio.

La sovetia ŝtato devas zorge gardi sin kontraŭ la spionado de la kapitalistaj landoj k la konspiroj de la blankuloj. Estas do tute memkomprenebla la ekzisto de severa cenzuro pri la poŝtaĵoj. Sed estas skandalo — kiu certe havos finon — ke iu persono profitas tian situacion por ŝirmi sian ambicion per mensoga denunco. Ĉiu leganto de "S-ulo", ĉiu inteligenta k honesta SAT-ano bone scias, ke "S-ulo" ĉiam estis tute lojala al Sovetio k publikigis — k publikigos — multe da materialo favora. Tial ni ripetas: danĝeraj malamikoj de Sovetio troviĝas en Moskvo.

Ni ankaŭ akceptas ¼ jaran abonon!

Pri la 1-a kongreso de Socialista Esperanto-Asocio (SEA) en Germanio

Aperis jam raporteto pri tiu Kongreso en la antaŭa n-o; sed dume ni ricevis ankoraŭ de alia ĉeestinto raporton, kiun ni ne povas publikigi; ni nur konigas kompletigcele kelkajn faktojn, kiuj ne troviĝis en la raporto publikigita en n-o 349. *Red.*

La kongreson ĉeestis 32 delegitoj el 23 lokaj grupoj, krome ĉ. 35 Gek-doj kiel gastoj. Laŭ la raporto de l' estraro SEA nun havas 1000 membrojn en 49 grupoj k 16 izol-membrojn.

Rilate al SAT oni akceptis (kontraŭ 1 voĉo) jenan rezolucion:

"La ĉeestantoj ĉiel penas konservi la Sennaciecan k Intertendencan karakteron de SAT. Ili komisias la PK de SAT fari sian eblon, por ke nunaj SAT-anoj ne povu kiel SAT-membroj detrui SAT-on, per malveraj argumentoj."

Tiun ĉi rezolucion ankaŭ akceptis la speciala kunveno de SAT-anoj.

TRA LA MOVADO

KRONIKO

BRITIO. Okazos en Castleton (Derbyshire) la 20-an k 21-an de junio semajnfina lernejo, organizata de la Mezlanda Federacio de BLEA. Ĉ. 30 geesp-istoj el la tiea regiono esperas ĝui instruan k agrablan semajnfinon. (7553.) — *ĈEĤOSLOVAKIO.* Esp. sekcio fondiĝis ĉe la Gimnastika unuiĝo en *Tlucna* ap. Plzen k aliĝis al la ĉeĥoslov. LEA. La K-doj, kiuj nur antaŭ ¼ jaro partoprenis kurson gviditan de K-do Pelcman, laboras tre vigle. Rezultis ankaŭ 2 aliĝoj al SAT (kun abono). — *FRANCIO. Lyon.* Laŭ la raporto de l' sekretario de Esp. Lab. Grupo dum ĝen. kunveno je 10. I., la membraro kreskis en 1930, malgraŭ nereaniĝo de kelkaj opoziciuloj. Ankaŭ estis pli granda la nombro da lernantoj. La elspezoj superis 4000 fk., k inkluzive la festa k libreja konto nia buĝeto atingas 10 mil fk. Spite diskutoj pri tendencoj, kiujn ŝovis partifanatikuloj en la kunvenojn, nia movado restas unueca. Lokaj organizoj k ties gazetoj subtenas nin. Niaj semajnaj kunvenoj estas bone vizitataj. Okazas ĉu perfektigaj lekcioj, ĉu paroladoj en esp-o. Jam K-do *Kam. Ru* traktis temon: "Teknikistoj k revolucio", K-do *Pere* parolis pri "Tunizio" k K-do *132* pri "la ekonomia ekspansio de Usono en Centran Amerikon". Nova kurso kun 10 p. gvidata de K-do Andreani. —

GERMANIO. Riesa (Elbe). La 30-an de aŭg. okazos ĉi tie la distriktkonferenco de LEA-distrikto Lajpcig kun dekjara datrevena festo de l' loka grupo. Ni planas aranĝi interesan ekspozicion k tiucele organizas peresp-an laboron (ankaŭ por parencaj organizoj: radioamatoroj, liberpensuloj, naturamikoj ktp.). La loka LEA-grupo havas 63 membrojn. — *W. B.*

Hispanianoj!

En via lando mi deziras labori kiel meblisto k loĝi ĉe esp-isto por ĝisfunde studi hispanan k ev. instrui la francan.

Marc Borg, 24, Bd des Ecoles, en Châtel-Aillon, Chte. Infr, Francio.

Somera surprizo

fariĝis por la esperantistaro la verkoj de la fama hungara verkisto

Kolomano Kalocsay

tradukinto de **Tragedio de l' Homo** ĉefredaktoro de **Literatura Mondo**

Fine de julio samtempe aperos la tri verkoj:

Streĉita Kordo

Originalaj poemoj de la verkisto. Vi trovos en ĝi la plej famajn poemojn: "La patrineco", "Pala procesio" k. a. 192-paĝa. Bindita P. 6.50, broŝ. P. 4.50

Rimportreto

55 portretoj de esperanto-steloj el ĉiuj tendencoj de la movado, kun foto de la "steloj". 128-paĝa.

Bindita P. 5.—, broŝ. P. 3.—

Lingvo, Stilo, Formo

Studoj pri esperanto. La plej abundaj klarigoj pri la esperanta versfarado, rimaro, internacia stilo, pri la evoluo de esperanto verkita de la plej fama nuntempa stilisto. 160-paĝa.

Bindita P. 5.40, broŝ. P. 3.40

Al la prezoj aldonu 10% por sendkostoj. Kiuj mendas ĉiujn tri verkojn kune ĝis la 15-a de julio (ekstereŭropanoj ĝis 1. aŭgusto) ricevas

la broŝuritan eldonon anstataŭ P. 12.— por P. 10.— (afrankite)

la binditan eldonon anstataŭ P. 18.60 por P. 15.40 (afrankite)

Por koni pli detale, postulu detalan prospekton

Rapidu mendi ĉe la eldonejo

Literatura Mondo

(Bleier Vilmos) Hungario, Budapest IX. Boráros tér 6. IV. 11.

(Hungara poŝtŝparkasa konto Budapest, 25, 168) aŭ ĉe *Administracio de SAT, Leipzig O 27.*

ĈE LA NEŬTRALULOJ

En Sidnejo (Aŭstralio) la Eduka Ministro diris al delegitaro, ke eksperimento pri instruado de esp-o en lernejoj estos farata. Li esprimis sian opinion, ke universala lingvo estas unu el la plej urĝaj bezonoj en la intereso de l' paco.

*

Por la 14-a internacia stenografista kongreso (Parizo, 3.—7. aŭg.) esp-o estas akceptita samrajte kiel la naciaj lingvoj. Okazos dum tiu kongreso esp-ista fakkunsido, esp-stenografia konkurso, ekspozicio kun speciala esp. fako. Adr.: Griffon, 52, rue de Chabrol, Paris X.

MEMORNOTO

Peresper. materialon represis:

Le Semeur, Falaise, n-o 185 (pri virino en Hindio).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

The Labour Woman, junio (rubr.), *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 27. 5., 3. 6.; *Signalen,* Stokh., 28. 5.; *Freie Presse,* Strasbg., 29. 5.; *La Ligue,* Lyon, n-o 3 (ĉi tiu gazeto de la "Ligo de Homrajtoj" represas detalon pritrakton pri respondoj ricevitaj sekve de enketo de ĝi farita pere de sia esp-ista sekretariejo).

NIA POŜTO

2474. — Via manuskripto bezonas esti lingve k stile prilaborata, antaŭ ol esti presinda; sekve via postulo, ke ni nenion forstreku, malebligas al ni ties enmeton. *Red.*

10 512. — Ne! — Ne jam eldonita.

Al multaj! — Kun n-o 351 finiĝas granda parto da abonoj. Por eviti interrompon en la ekspedado ni petas tuj renovigi la abonon. *Adm.*

Gek-doj ĉiulokaj!

Ni dez. ricevi esp. varbaĵon por ekspozi en nia propagandkesteto (30 ×45 cm). Bv. sendi flugfoliojn k priesp. gazetartikolojn germanlingvajn, PI, precipe el negermanaj landoj k ĉion taŭgan. Ĉio helpanto estas kompensota per bela vidaĵkarto aŭ, kiom eble, laŭ sia deziro. Adr.: Christian Binder, Grabeng. 4, Wels (Aŭstrio).

ATENTU! Potsdam-a Lab. Esp. Grupo aranĝos la 1. julio letervesperon. Skribu multnombre! Resp. garantiata. Adr.: K-do Otto Koth, Lennestr. 44, **Potsdam** (Germanio).

ENHAVO

	paĝo
Tridek tri fenigoj por ĉiu kadavro	**297—298**
La Grenfabriko de Zernograd	**298—299**
Pri sugesto k memsugesto	**299**
La klasbatalo tra la mondo	**299—300**
Abortiga paragrafo k senlaboreco	**300—301**
La ekonomia penetrado de Usono en Centran Amerikon	**300—301**
Kontraŭ la dogmojn	**301—302**
Tra Esperantio	**302—304**

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)